**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

INVERSA VORTARO
de Esperanto
denove havebla
Prezo 4,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 13/1974 8 aprilo 1974
Aperas ĉiusemajne

## Komuniko de la Akademio de Esperanto

Daŭrigante sian pretigon de la 8-a Oficiala Aldono al la Universala Vortaro kaj de la Baza Oficiala Radikaro, kiujn mi esperas povi publikigi baldaŭ en dua kajero de la Aktoj de la Akademio, la Akademio jam voĉdonis pri du gravaj punktoj kaj alvenis al decidoj jenaj:

1) La Akademio, post vastaj internaj diskutoj, malkonsilas la uzadon de la prepozicio PO por esprimi la rilaton indikitan per la frakci-streko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj EN, JE, POR aŭ SUR, laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverban formon, kiel "30 kilometroj(n) hore".

2) La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;
konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;
memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;
opinias, ke la okazo de la sufikso -io apud la fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa uzado; kaj
nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

Vitry, la 4-an de Februaro 1974

La Prezidanto de la Akademio
G. Waringhien

******************

## 30-a Internacia Junulara Konferenco

Münster (pp) Cento da gejunuloj el 23 lando intertempe aliĝis al la 30a IJK de TEJO kun la ĉeftemo "Junularo kaj Edukado". Tiu evoluo kompare al aliaj TEJO-kongresoj estas tre kontentiga, sed ĝi ankaŭ iom timigas la lokajn preparantojn: la disponeblaj loĝigebloj ne estas senlimaj, kaj al interesatoj oni rekomendas frue aliĝi.
Rilate la programon, daŭre estas projektataj prelegoj kaj laborgrupoj pri internacia junulara interŝanĝo, pri reformo de altlernejoj, kontraŭaŭtoritata edukado, lingvoinstruado kaj grupeto pri TEJO-laboro. Enkondukan prelegon faros prof. d-ro Helmar Frank, aŭtoro de la "tezoj pri germana lingvopolitiko".
Cetere la LKK, kiu nun disponas pri propra oficejo, dediĉas apartan atenton al la preparo de adekvata kadra programo.
Adreso: 30a Internacia Junulara Konferenco, D-4400 Münster, Mondstrasse 3, Tel. 02504/7113

## Novaĵoj el Taŝkento

En februaro 1974 okazis kun-sido de la Esperanta Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio. Dum tiu kunsido estis akceptita laborplano de la Komisiono por la kuranta jaro.

La ĉefa tasko de la plano estas daŭrigi amikan, kulturenhavan korespondadon kun pli ol 350 da gekorespondantoj, interŝanĝon de kulturaj valoroj kun diversnaciaj geesperantistoj, diskonigo de la historio, kulturo kaj vivo de Uzbeka popolo.

En Uzbekistano, ĉi-jare, oni celebros la 50-jaran jubileon de la Respubliko. Lige kun tio, oni eldonos diverslingvajn broŝurojn pri tiu evento. La Esperanto-Komisiono penos eldoni Esperanto-broŝuron. La Komisiono planas aperigi artikolojn pri la agado de geesperantistoj de Uzbekistano, sur la paĝoj de la organo de la Asocio "Soveta Uzbekistano Hodiaŭ", eldonata en angla, franca, hinda, hispana kaj urdua lingvoj.

La Esperanto-Komisiono ankaŭ planas organizi reciprokajn ekspoziciojn kun eksterlandaj esperantaj organizaĵoj. La unuan tian ekspozicion oni organizas kun filio de Pola Esperanto-Asocio en Lodzo. La Komisiono intencas aperigadi informojn pri la agado de la Esperanto Komisiono kaj de apartaj esperantistoj sur paĝoj de la lokaj tagĵurnaloj kaj gazetoj.

Kiel ĝojigan fakton pri la favora rilato de sociaj organizaĵoj al la agado de esperantistoj en la kadro de la Uzbeka Amikeca Asocio, oni povas mencii la elekton de samideano Petro Poliŝĉuk dum la 3-a Respublika Konferenco de la Asocio pasintjara kiel membron de la Prezidantaro de Uzbeka Amikeca Asocio.

En ĉiuj aranĝoj de la Esperanto-Komisiono tre aktivas membroj de la Esperantista Klubo ĉe la Taŝkenta Domo de Sciencistoj de la Akademio de Sciencoj de Uzbekistano. (PePo)

***************

## Petro Poliŝĉuk

Kion fari, se sin vivo movas?
Kion fari, se la Muzo dormas?
Kion fari, se la Poezio,
Ne deziras esti mia Mio?

Kion fari, se la verda Muzo
Karakteron havas, ege, ruzan,
Kaj l'inspiron donas nur pogute,
Nevolante helpi min entute?

Homtalenton sorto, ja, ne vendas
Kaj neniu ĝin de l' sorto mendas,
Ĉar talento homa estas nura
Eco, kiun donas la Naturo!

***********************

## Informoj el Francio (lgtx)

La nacia televido (F), 3a kanalo, prezentis la 20an de marto elsendon pri la vivo de pola familio en Francio. La lerta kaj sentoplena komentisto de la 25-minuta programo estis I. Flaczynski, sekretario de la Nord-Franca Esperanto-Federacio.

Novaĵoj pri Esperanto aperas en la revuo ELAN (redakcio: 31 rue Foch, F-59126 Linselles), jam de dudek jaroj.

Grafologia studo pri manuskripto de d-ro Zamenhof aperis en franca ĵurnalo. La teksto de J. Grossin estas havebla, kontraŭ irk, ĉe "La Depeche", 57 Rue Bayard, F-31000 Toulouse. (Temas pri n-ro 9351 de la 17 marto 1974)



## Ĵurnalista jubileo

Kazimierz Małychy, pola ĵurnalisto kaj redaktoro de Ilustrowany Kurier Polski en Bydgoszcz festis antaŭ nelonge sian 50-jaran profesian jubileon. Okaze de tiu jubileo la ĉefredaktoro Witold Lassota honorigis la meritplenan ĵurnaliston, kiu ankaŭ estas konata pola esperantisto, dum solenaĵo en la redakcia klubo (vidu la foton!).
Ilustrowany Kurier Polski regule aperigas informojn pri Esperanto dank' al la laboro de K. Małychy, kiu tiucele ankaŭ utiligas informojn el Pilo-Press. (Vidu dekstre: Ministro en Bonn pri Esperanto).
Pilo-Press kore gratulas al la jubileulo!

**MINISTER BOŃSKI O ESPERANCIE**

Przygotowania do 59 Światowego Kongresu Esperantystów, zwołanego w tym roku do Hamburga (NRF), są w pełnym toku. O stanie przygotowań kongresowych informowany jest również wysoki protektor kongresu — federacyjny minister oświaty i nauki dr Klaus von Dohnanyi, który niedawno bawił w Hamburgu.

O stanie przygotowań do światowego parlamentu esperanckiego poinformowała ministra czteroosobowa delegacja Komitetu Organizacyjnego Kongresu z prezesem Związku Esperantystów w NRF dr W. Bormannem na czele.

Min. Dohnanyi oświadczył m. in., że dobrze rozumie teksty esperanckie — dzięki znajomości innych języków. Oświadczył również, że interesuje go sprawa języka międzynarodowego jak i wszelkie sprawy związane z kongresem esperanckim w Hamburgu.

******************

## Romolo-kunveno en arbaro kaj sunbrilo

Ober-Ramstadt (pp) Pli ol 50 esperantistoj el la Rejn-Majn-Regiono kunvenis en la naturamika domo Ober-Ramstadt dimanĉe, la 7 aprilo 74. Por Rejn-Majn-Ligo tiu kunveno en naturamika domo estis eksperimento, des pli ke ĝin preparis nova juna teamo de Esperanto-Inform-Grupo Darmstadt sub gvido de Eckhard Woite proponante labortemon "Ĉu Esperanto estas politika afero?". Nu, oni povas konstati, ke la eksperimento sukcesis: la kunveno eĉ kontentigis la pesimistojn. Certe al tio kontribuis la bela vetero kaj la bona, malmultekosta manĝaĵo, kiun la inaj membroj de la Esperanto-Inform-Grupo mem preparis kaj servis.

Post enkonduka diskuto formiĝis 4 grupoj, kiuj diskutis pri 4 temoj: Konscio kaj Esperanto; La vojo al ĝenerala enkonduko de Esperanto; Gastlaboristoj kaj la internacia lingvo; Turismo kaj Esperanto. La grupgvidantoj poste raportis al la plenkunsido pri la rezultoj de la grupaj diskutoj. Estis kelkaj vere interesaj pensoj kaj ideoj, pri kiuj Pilo-Press raportos en unu el la venontaj eldonoj. Pri la du aliaj temoj: La sinteno de politikistoj kaj Kiujn ŝanĝojn kunportos la ĝenerala enkonduko de Esperanto? ne estis granda intereso.

***************

## Invito al Zamenhof-Solenaĵo

Vieno (pp) Aŭstria Esperanto-Federacio kaj la Pola Instituto en Vieno invitas al Zamenhof-Solenaĵo la 20 aprilo 1974. La programo konsistas el du partoj:

15,30 horo: Meto de florkrono ĉe la Zamenhof-Monumento Wien, im Börsepark, Wipplingerstrasse fare de reprezentantoj de Aŭstria Esperantista Federacio kaj de Pola delegacio.

16,30 horo: Solenaĵo en la Pola Instituto, Wien 1, Am Gestade 7 (Angulo Tiefer Graben)
Festparolado de prof. d-ro Karl Beckmann:
"Tamen Esperanto..."
Koncerto de polaj artistoj
Prezento de Polaj kulturfilmoj

Laboreja interparolo en Wiesbaden

Wiesbaden (pp) Laŭ iniciato de prof. d-ro Helmar Frank okazos en Wiesbaden, la 18 aprilo 1974, 14 - 17 horo, Hotel Blum, Wilhelmstrasse 44/46, la 1a Lingvokibernetika-klerigoteknologia laboreja interparolo. Referentoj estas: Prof. Frank, d-ro Wolfgang Schmid, Siegen, Dipl.-Psych. Brigitte S. Meder,Paderborn, Günther Becker, Blieskastel, Hermann Behrmann, Löhne, Dr. Alfred Hoppe, Bonn, kaj d-ro Hans Kasselmann, Paderborn.

Salutojn al Pilo-Press

kaj al ĉiuj legantoj sendis: Walter Sonderegger el Brasilia kaj La Paz okaze de sia vojaĝo al Sudameriko. Li komentas:"Esperantistoj de Caracas, Bogota, Lima, Santiago, Sao Paulo, Belo Horizonte, Brasilia, Manaus, Salvador, Recife, Lisbono kaj Madrid multe helpis al mi."

Andrzej Pettyn, redaktoro de Pola Radio, el Sofio okaze de unusemajna E-movada stud-vizito.

*****************

VIII-a Kunordiga Konferenco en Maribor

Maribor (mĝ) La VIII-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en la lernejojn okazos en Maribor, Jugoslavio, la 13an kaj 14-an de aprilo 1974. Al la konferenco partoprenos nur respondeculoj de la kvin kunlaborantaj landoj (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio) kaj oni antaŭvidas kelkajn oficialajn observantojn kaj instruistojn. La programo de la konferenco konsistas el raportoj, pritrakto de la tria instrujaro kaj okazigo de "Somera lernejoj" en Primoŝteno; krom tio programo de estonta laboro en I-a regiono de ILEI kaj preparo de la Dokumento I de PDE.

******************

Esperanto en la radio

Varsovio. La leterkesto de la 4 aprilo kaj la dimanĉa-lunda Esperanto-Ekspreso estis sub la impreso de la 15jara jubileo de la Esperanto-elsendoj el Varsovio. Jan Klimek felietonis pri la signifo de la jubileo. La redakcio ricevis okaze de la jubileo leterojn kaj poŝtkartojn, kiujn oni traktos en la estontaj leterkestoj. Je la jubilea tago mem alvenis 3 telegramoj el Nürnberg, Leipzig kaj Bruselo. Ankaŭ la lunda koncerto kun bondeziroj aludis la jubileon. Dum la E-Ekspreso oni ripetis la peton pri rapida aktuala informado fare de la aŭskultantoj. La informoj aperas en la rubriko "Niaj aŭskultantoj sciigas".

Berno. D-ro A. Baur finis sian prelegserion pri la alpoj per interesa prelego pri la turisma loko Arosa, kaj ges-roj Gacond faris sian lastan prelegon pri la lingvoproblemo en la mondo.

Vieno. Iom post iom pliboniĝas la aŭdebleco. Tre aktualaj kaj interesaj estas ĉiam la komentarioj pri la politika kaj ekonomia vivo en Aŭstrio de d-ro Macher, same la raportoj pri kulturaj aferoj de d-ro Beckmann. Post ĉiu elsendo, oni mencias la korespondaĵojn de aŭskultantoj, kio montras ke Vieno jam trovis fidelan rondon de aŭskultantoj.

Libroproponoj

| | |
|---|---|
| Inversa Vortaro de Esperanto de d-ro Klaus Schlüter | 4,-- DM |
| Esprimoj de sentoj en Esperanto de Edmond Privat | 2,80 DM |
| Senĝenaj dialogoj de Alberto Fernández | 12,50 DM |

Juna Amiko, revuo por lernantoj kaj komencantoj
Provnumero, n-ro 1 kaj n-ro 2 3 numeroj 3,-- DM